Komuniko UK 7

Karaj,

La Universala Kongreso en Bonaero venis al fino hierau, per bonestosa ferma ceremonio. Ni nun prilaboras resumon pri la sentekste faritaj fermaj vortoj de la prezidanto de UEA; tion vi post kelkaj tagoj ricevos. La rezolucio disiris kiel Gazetara Komuniko, tio estos ricevebla kontrau peto de mi au la Centra Oficejo. Tradukoj al la angla kaj hispana estas survojaj - tre eble ankau al pliaj lingvoj. Vizitu la kongresan retejon de UEA por aliri la tekston en Esperanto, kaj en chiuj lingvoj, kiuj havas pretan tradukon. Bv. eluzi tiujn, kaj proponi helpon por krei pliajn tradukojn!

Mi nun aldonas dokumenton kun kelkaj bildoj el la Landaj Salutoj en la inauguro - poste ni kompilos pli kompletan serion kun aldonitaj informoj.
La fotojn faris Marija Belosevic el Kroatio.

Kun koraj salutoj el Bonaero,

Stefan MacGill
Vicprezidanto de UEA
Komisiito de ILEI pri la retkurso 'Esperanto Etape'.

http://www.uea.org/pdf/KomunikoLandajSalutoj.pdf